

Zhāng Jì,
Fēngqiáo Yè Pō

Yuè luò wū tí shuāng mǎn tiān,
jiāng fēng yú huǒ duì chóumián.
Gūsū chéng wài hán shānsì,
yèbàn zhōng shēng dào kèchuán.

Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas Zhāng Jì.

Arg-912-1820 (2013-08-13 16:32:48)

Pri la poeto vidu la retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Ji_\(poet_from_Hubei\)](http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Ji_(poet_from_Hubei)).

Zhāng Jì,
Ĉe la acera ponto

tradukita de Manfred Retzlaff

Nebulo nokte elspiriĝas nun
kaj krepuskiĝas la duona lun'.

Ĉe l' bord' flagrantan fajron vidas mi,
lumigas la ĉirkaŭon tiu ĉi.

Ne dormas mi. Kornikoj krias jen.
De l' meza nokto baldaŭ la alven'.

De roka monaĥejo zumas sonoril',
kaj poste ree regas nokt-trankvil'.

*Traduko de la ĉina poemo "Fēngqiáo Yè Pō" de Zhāng Jì en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-912-1822 (2013-07-27 09:13:31)